# RAPORTO PRI LA LABORO KAJ FINANCOJ

## JARO 2018 – PUBLIKA VERSIO

Estimataj membroj de edukado.net
Sube vi povas legi la raporton pri la jaro 2018, pri la tiamaj laboro kaj financaj aferoj de la Fondaĵo edukado.net. Ni esperas, ke la raporto kaj niaj rezultoj kontentigos vin kaj vi daŭre sekvos kaj subtenos nian laboron.


**RAPORTO PRI LA LABORO KAJ FINANCOJ** ........ **1**

I. ĈEFAJ AGADKAMPOJ ........ 2
*I.1 Kursoj, trejnadoj* ........ *2*
*I.2. Aliaj regulaj kaj unufojaj agadoj dum la jaro* ........ *3*
**II. STATISTIKO PRI LA RETEJO** ........ 5
*II.1 Nur kelkaj ciferoj* ........ *5*
*II.2. Membroj laŭ landoj* ........ *5*
*II.3. Uzo de la ekzercoj en la sekcio Instrumaterialoj* ........ *5*
*II.4. Kampanjo por registrado de kursoj* ........ *6*
**III. POPULARAJ EROJ, GRAVAJ TASKOJ** ........ 6
*III.1. Risko  https://edukado.net/ludoj* ........ *6*
*III.2. KER-ekzamenoj* ........ *7*
*III.3. Ekparolu!* ........ *9*
*III.4. POZNAN: Interlingvistikaj Studoj* ........ *10*
*III.5. Ĉeestaj kursoj kaj laboro dum UK* ........ *11*
*III.6. Programista laboro kaj kostoj* ........ *11*
*III.7. Monkolekta kampanjo – Zamenhof-puzlo* ........ *12*
*III.7. DANKON al la kunlaborantoj kaj al ESF* ........ *12*
**IV. PLANOJ POR LA JARO 2019** ........ 12
*IV.1. Teknikaĵoj pri la paĝaro* ........ *12*
*IV.2. Trejnadoj – daŭra kunlaboro ankaŭ kun ILEI* ........ *13*
*IV.3. RISKO* ........ *13*
*IV.4. KER-ekzamenoj* ........ *13*
*IV.5. Kontaktoj, kunlaboroj* ........ *13*
*IV.6. Kursejo* ........ *14*
*IV.7. Ekparolu!* ........ *14*
*IV. 8. Klerigejo – liberaj studoj* ........ *14*
*IV.9. Ni serĉas helpantojn por difinitaj taskoj* ........ *14*
**V. FINANCOJ** ........ 15
*V.1. Ĝenerala klarigo* ........ *15*
*V.2. Enspezoj en 2018* ........ *15*
*V.3. Regulaj subtenantoj bezonatas* ........ *16*
*V.4. Vojaĝoj* ........ *16*
*V.5. Multflanka subteno de ESF* ........ *16*
*V.6. Donacoj por edukado.net en la jaro 2018* ........ *17*
*V. 6. Resuma financa tabelo* ........ *19*

## I. ĈEFAJ AGADKAMPOJ

| | |
|---|---|
| 3a de januaro kaj 1a de marto | Nederlando – Amsterdamo, prononc- kaj lingva helpo al la teatra grupo |
| 16a de marto | Nederlando – Den Bosh, Teatra festivalo kun E-teatraĵo " La plej bona ideo" |
| 16a de junio | 7ª Tutmonda Ekzamentago |
| 28a de junio ĝis la 13a de julio - | Usono – Raleigh - NASK-kursaro (kurso, KER-ekzameno) |
| 20a de julio - ĝis la 28a de julio - | Hispanio – Madrido- ILEI-konferenco , Instruista trejnado–seminario, ekzameno |
| 28a de julio ĝis la 04a de aŭgusto- | Portugalio – Lisbono - UK (kursoj, prelegoj, KER-sesio) |
| 04 -05a de aŭgusto | Portugalio – Lisbono Simpozio |
| 31a de aŭgusto – 02 de septembro | Nederlando – Leeuwarden – Lingva festivalo (modellecionoj) |
| 19-23a de septembro | Pollando – Poznan UAM , ARKONES |
| 19 – 21a de oktobro | Germanio – Aalen – FAME-kulturpremio de Ilona Koutny |
| 25a de oktobro | Nederlando – Nijmegen – Marc van Oosterdorp, prelego |
| 17a de novembro | Nederlando – Roterdamo – Malferma Tago |
| 27- 30a de novembro | Pollando – Nowy Sacz – Modellecionoj |
| 10a de decembro | Nederlando – Wassenaar, Sonregistrado por la Apo *Drops* |
| 15a de decebro | Nederlando – Hago – Tutmonda Skajpa Zamenhof-festo |
| 27a de decembro | Svislando – vizito kaj kunsido kun Mireille Grosjean pri kunlaborebloj |

### *I.1 KURSOJ, TREJNADOJ*


*Ĉi-sube vi trovas liston pri la plej gravaj agadoj kaj taskoj, kiujn nia teamo efektivigis dum la jaro 2018. La menciitaj aranĝoj kaj produktoj plej ofte estos en la sekvaj paĝoj raportitaj ankaŭ pli detale kaj / aŭ vi trovas ligon al detalaj raportoj en la paĝaro mem.*

- *Nia redaktoro, Katalin Kovats kaj ŝia edzo, estrarano de la Fondaĵo Edukado.net, dum la jaro 2018 okazigis ĉeestajn lingvokursojn kaj trejnadojn, en pluraj landoj de du kontinentoj.*
- *La ĉefaj du agadoj en la kampo de trejnado koncentriĝis je la* ***kunlaboro kun ILEI****. La Ligo kaj Katalin Kovats kreis du projektojn, kies celo estis trejni Esperanto-instruistojn. K. Kovats oferis mallongigitan version de sia RITE-programo, kaj kontraŭ malaltigita prezo proponis retan kurson kun persona gvidado por 25 aktivulo de ILEI, kiuj devis fini la metodikan kaj gramatikan kursmaterialon ene de 10 monatoj kaj povis (povintus) partopreni* ***ĉeestan trejnadon kun Katalin Kovats dum la ILEI-konferenco en Madrido****.*
  *Samtempe, simila programo kreiĝis por afrikanoj, kiuj povintus sekvi en novembro ĉeestan trejandon en Afriko, sub la gvido de Mireille Grosjean.*
  *Al la kurso EIT-Madrido aliĝis fine 9 personoj kaj en Madrido ĉeestis 4 kursanoj, el kiuj nur unu, Elisabeth Dru el Francio per modelleciono finis la kurson. La aliaj du kolegoj, kvankam ili prezentis modellecionojn, havas ankoraŭ ŝuldojn. La kvara kursano, pro personaj kaj prisanaj kialoj, ne povis sekvi la kurson, pro tio eĉ ne ekzameniĝis.*
  *https://edukado.net/novajhoj?t=2&id=755*
- *La projekto EIT-Afriko same ne portis la atenditajn rezultojn. La aliĝintoj ne plenumis la retajn taskojn, plurajn el ili, pro manko de teknikaj rimedoj, ni devis malaligi. La ĉeesta seminario en Afriko ne povis okazi en 2018. Katalin Kovats kaj ILEI plilongigis la projekton, donis al 8 personoj pliajn eblojn kun difinitaj taskoj kaj ili ĉiumonate kontrolas ties plenumon. Fincelo estas: ĉeesta seminario kaj ekzameno en 2019 kune kun M. Grosjean surloke en Afriko.*
- En julio Katalin Kovats instruis dum somera kursaro de NASK en Raleigh, kie Katalin okazigis ankaŭ KER-sesion kaj trejnis tri stipendiitojn, kiuj observis ŝiajn lecionojn, partoprenis en la planado de la kurso, okazigis mem lecionpartojn kaj trejniĝis pri gvidado de KER-ekzamenoj. La koncernuloj jam somere en 2018 gvidis mem kursojn kaj okazigis KER-sesiojn.
  https://edukado.net/novajhoj?t=2&id=754
  https://edukado.net/novajhoj?t=2&id=758

- Komence de septembro K.K. kaj S.L. partoprenis en Nederlando Lingvan Festivalon, kie ili prezentis modellecionojn kaj partoprenis la sukcesan informaranĝon, gviditan de

Esperanto Nederland. https://edukado.net/novajhoj?id=761

- En septembro Katalin vojaĝis al la pola urbo Poznano, por helpi en la Interlingvistikaj Studoj, enketi inter la studentoj kaj partopreni ankaŭ per prelego la aranĝon ARKONES.
- Fine de novembro Katalin Kovats veturis al Pollando – Nowy Sacz, kaj tie en la lokaj altlernejo pri Fremdaj Lingvoj kaj Pedagogia Instituto okazigis modellecionojn al nombraj grupoj de studentoj. La prezentoj havis grandan sukceson kaj la direktorino de la altlernejo pretos enkonduki Esperanton aŭ Interlingvistikon, se troviĝus kompetentulo, kiu laborus tie. Jen raporto pri la vizito kaj aperis pri ĝi ankaŭ artikolo en la ferbruara numero de la Revuo. https://edukado.net/novajhoj?id=772
- En 2018 la RITE-kurso, lokita en edukado.net kaj manaĝita de Katalin Kovats, finpretiĝis. La 100-leciona, tre ampleksa kursmaterialo kun ekzercoj kaj praktikaj partoj, ebligas profesinivelan trejnadon de Esperanto-instruistoj. La unua kursfininto kaj ekzameniĝinto estas Patrick Morando el Italio, kiu diligente laboris kaj dume jam fondis klubon en sia urbo Ĝenovo, kie li ekinstruis la lingvon kun sukceso. Li ankaŭ registriĝis en Italio kiel eksperto pri Esperanto. https://edukado.net/novajhoj?id=759
- UK[1] – Lisbono
  En Portugalio, dum la kongreso Katalin K. kaj Sylvain Lelarge gvidis paroligajn kursojn je du niveloj, sume entute dum 16 lecionoj kun la partopreno de 100-120 personoj ĉiutage.
  K.K. kun S. L. okazigis kaj gvidis dumkongresan KER-sesion, kie ŝi mem ankaŭ ekzamenis.
- **Tutjara mastrumado de la RITE[2]-kursanoj**, kies materialoj kaj produktoj riĉigas la retejan kolekton.
- En decembro Katalin Kovats estis petita kontroli la vortliston en la apo **Drops** kaj fari la sonregistraĵojn de 400 novaj vortoj de la vortolerniga programo, deklarita kiel la plej bona lingvoinstrua apo de la jaro 2018. Tiel ŝia voĉo estas jam en tri popularaj apoj kaj programoj: uTalk, Learn Languages with Venka, kaj nun Drops.




## I.2. ALIAJ REGULAJ KAJ UNUFOJAJ AGADOJ DUM LA JARO

- Organizado kaj efektivigo de la KER-ekzamenoj kaj organizado de la Sepa Tutmonda Ekzamentago, (aprilo-majo 2018, kun 116 sukcesintoj en 2+15 lokoj de deko da landoj). Dum la tuta jaro sukcese ekzameniĝis el 197 aliĝintoj entute 161 personoj. https://edukado.net/novajhoj?id=729
- **Gvidado de la laboro de Konstanta Ekzamena Sekcio (KES**) de UEA.
- **Ĉekomputila deĵorado por respondi demandojn kaj korespondado kun la membroj de la retejo**, por helpi ilin en instruaj kaj metodikaj situacioj, konsili pri lingvoproblemoj, ktp.
- Nia redaktoro estas ankaŭ onklino en la programo *Ekparolu!* Kadre de tiu ĉi agado **ŝi okazigis 26 sesiojn en 2018** kaj krome regule instruas kelkajn eminentulojn de la movado.
- K.K. manaĝas ankaŭ du Facebook-paĝojn kaj grupon. Regula anoncado de eventoj kaj atentigoj en la paĝaro de edukado.net kaj animado de la fermita grupo de la genevoj kaj geonkloj de Ekparolu!, kie okazas ankaŭ neformala instruado de gramatikaĵoj kaj leksikaĵoj.
- Regula sendado de **artikoloj kaj informoj al la revuoj**: IPR kaj Esperanto, ĉefe pri la KER-ekzamenoj, agado kaj laboro de la paĝaro.
- **Poznan: la redaktoro varbos partoprenantojn** por la novaj kursoj kaj Interlingvistikaj Studoj, ŝi lanĉis kampanjon por trovi subvencimonon por la kursanoj de Poznan kaj ene de la sistemo de RITE kaj KLERIGEJO donos kaj prizorgas studspacon por la kursanoj.

[1] ***UK: Universala Kongreso***
[2] ***RITE: Reta Instruista Trejnado ĉe Edukado.net***

- Laŭ peto de ESF[3] kaj UEA[4]: KK. **gvidas la stipendian komisionon** por la studentoj de Poznan. Aktive subtenas la studentojn per konsiloj kaj kolektas *monhelpon por ili*.
- *Laŭ la invito de ESF, Katalin Kovats partoprenis en Lisbono la Nitobe Simpozion, kies ĉefa temo estis la pritraktado de universitatnivela instruado de Esperanto.* [*https://edukado.net/novajhoj?id=766*](https://edukado.net/novajhoj?id=766)
- Daŭra arkiva laboro estas sekvi la vivon kaj la morton de eminentaj esperantistoj, kolekti pri ili informojn, premie prezenti ilin en la **Panteono de la paĝaro,** kiu servas kiel fidinda informfonto por aliaj movadaj amaskomunikiloj kaj asocioj. En 2018 estis enpanteonigitaj 12 novaj instruistoj de Esperanto. https://edukado.net/novajhoj?id=775
- Povas ŝajni privata afero, tamen menciindas, ke nia redaktoro ankaŭ ĉi-jare, kiel jam de kvin jaroj **flegas en Hago konatan esperantiston, Mila van der Horst-Kolinska**, nian iaman regulan subtenanton kaj sponsoron.
- **La plej bona ideo por ĉiuj - recenzo pri teatraĵo**

  "House of Nouws", nederlanda teatrogrupo de junuloj kreis teatraĵon pri Esperanto, kiun ili prezentis en prestiĝa tutsemajna kultura festivalo.
  La redaktoro de edukado.net helpis la grupon per informoj, ilustraĵoj, ekzercigis al la aktoroj la prononcadon kaj ĉeestis la ĉefprovon kaj la premieron. La prezento donis multajn okazojn por diskonigi informojn pri Esperanto, dum la festivalo kaj ankaŭ en la regionaj gazetoj. Ĉar malmultaj esperantistoj povis spekti ĝin, Katalin verkis detalan prezenton pri la evento kaj ni publikigas ĝin ĉi tie en la horo de la lasta festivala ludo de la spektaklo, tiel ne ĝenante la ĝuon de la eventualaj spektantoj.
  https://edukado.net/novajhoj?t=2&id=737
- Fine de la Universala Kongreso en Lisbono estis anoncita, ke danke al la decido de la estraro de UEA, **Premio Deguĉi de la jaro 2018 estas aljuĝita al: Katalin Kováts**. La laŭdad-tekston kaj la filmeton pri la transdono vi povas vidi tra la ligilo: https://edukado.net/novajhoj?t=2&id=756
- Meze de oktobro okazis en la germana urbo Aalen la transdono de la FAME premio, kaj nia redaktoro K. Kovats, kiel la antaŭa premiito, estis invitita ĉeesti la feston, kiam Prof. Ilona Koutny transprenis la honorigan premion de la urbestro de Aalen. La vojaĝon de Katalin financis ESF, la restadon prizorgis la urbaj instancoj. Dum la vizito de la fama biblioteko de Aalen edukado.net ricevis plurajn brokantaĵojn kun la celo donace premii per ili la kunlaborantojn de la paĝaro, kiel ekz. geonklojn de la projekto Ekparolu! https://edukado.net/novajhoj?id=765

[3] *ESF: Esperantic Studies Foundation*
[4] *UEA: Universala Esperanto-Asocio*

## II. STATISTIKO PRI LA RETEJO


Detalajn statistikajn informojn pri la membroj kaj diversaj partoj de la paĝaro vi povas trovi en la statistika paĝo: [http://www.edukado.net/prie/sinprezento/statistiko?tipo=uzantoj](http://www.edukado.net/prie/sinprezento/statistiko?tipo=uzantoj)


### II.1 NUR KELKAJ CIFEROJ

Laŭ la mezuriloj inter julio 2009 kaj la fino de 2018 estis entute: 5236 membroj el 133 landoj (en 2017 ni havis 4909 membrojn.) La kresko estis ĉ. 350 novaj membroj, ĉar dum la jaro, pro duoblaĵoj kaj forpasoj, ni perdis kelkdekon da membroj.

### *II.2. MEMBROJ LAŬ LANDOJ*

Jam de pluraj jaroj Francio estas je la pinto de la membrostatistiko. Ĝis decembro 2018 entute 713 francoj membriĝis kaj multaj el ili tre regule, preskaŭ ĉiutage, uzas la retejon. La ranglisto apenaŭ ŝanĝiĝis kompare al la du lastaj jaroj.
*Novajn anojn ni varbas dum kongresoj, ĉeestaj kursoj, artikoloj, kaj publikaĵoj en Facebook en diversaj grupoj kaj paĝoj, sed multe helpas ankaŭ jamaj membroj, kiuj proponas nian paĝon al konatoj kaj amikoj.*




Vidu detalojn de la statistikaĵoj pri la uzantoj: [http://www.edukado.net/prie/sinprezento/statistiko?tipo=uzantoj/](http://www.edukado.net/prie/sinprezento/statistiko?tipo=uzantoj/)

### *II.3. UZO DE LA EKZERCOJ EN LA SEKCIO* INSTRUMATERIALOJ

### ***[https://edukado.net/instrumaterialoj](https://edukado.net/instrumaterialoj)***

En la kolekto Instrumaterialoj estas entute: **875** lerniloj, 124 724 elŝutoj kaj 2702 komentoj.

La elŝutnombro de lerniloj en 2018 kreskis kompare al la elŝutoj en la pasintaj jaroj, kiam ni iusence fermis la elŝuteblojn antaŭ tiuj, kiuj ne registris kurson, ne estis kontribuantoj aŭ subtenantoj de la paĝaro. En 2018 kreskis la nombro de tiuj personoj, sed samtempe ni donis al kelkaj grupoj la uzrajton, ekzemple al la partoprenantoj de la Ekparolu-programo, al tiuj membroj de ILEI, kiuj abonis kaj IPR kaj la revuon Juna Amiko, krome al diversaj trejnitoj kaj kursanoj.
En la redaktejo kuŝas plurdekoj da ekzercoj, kiuj atendas redaktadon, kontrolon, enpaĝigon, sed tiujn taskojn la redaktoro ne sukcesis komplete plenumi. Estus bone trovi helpantojn por tiuj laboroj, ĉefe lingvaj kontrolantoj bonvenus. (Legu IV.9.)

## *II.4. KAMPANJO POR REGISTRADO DE KURSOJ*

### [*https://edukado.net/instrumaterialoj*](https://edukado.net/instrumaterialoj)


Pro tiu fakto, ke la sekcio *Instrumaterialoj* aŭtomate malfermiĝas por tiuj, kiuj registras siajn kursojn, la situacio de la kursoregistradoj de jaro al jaro pliboniĝas, tamen ne estas ankoraŭ tute kompleta. Malgraŭ tio, ke kaj UEA kaj ILEI daŭre anoncas, ke la oficiala kaj la sola kursostatistiko troviĝas ĉe edukado.net, ni ne havas kompletan trarigadon pri la kurso-situacio en la tuta mondo.
Elire de la kelktagaj kursoj ĝis la tutjaraj, de movadaj kaj lernejaj, ni povas konstati, ke ni regule havas ĉ. 70-80 registritajn movadajn kursojn kaj ĉ. 40 lernejajn registraĵojn.
En la arkivejo troviĝas pliaj neaktualaj registraĵoj: 947 movadaj kursoj kaj 595 finiĝintaj lernejaj kursoj. https://goo.gl/kLFHY3
Tiu arkivejo konservas la registraĵojn, eblos reserĉi kursojn, instruintojn kaj aliajn informojn. Espereble foje iu ŝatus serioze studi la fenomenon de Esperanto-kursoj en la mondo kaj en tiu situacio nia retejo povos doni valorajn informojn.
Pro diversaj teknikaj kialoj la ĝis nun aperinta mondmapo kun la kurslokoj ekde 2019 ne plu funkcios en la paĝaro.

## III. POPULARAJ EROJ, GRAVAJ TASKOJ

### III.1. RISKO *HTTPS://EDUKADO.NET/LUDOJ*




Tre populara parto de la retejo estas ankoraŭ la ludo RISKO. Tage ĉ. 70-80 personoj venas, eĉ plurfoje ensalutas en la retejon por ludi aŭ kontroli la rangliston.
Fine de 2018 ni havis precize 1025 registritajn ludantojn.
En 2018 ni ekhavis entute 73 novajn ludantojn. La novuloj aperas en la reto post surlokaj ludoj, kursoj, seminarioj kaj prelegoj.
Daŭre funkciis ankoraŭ la deviga ripozperiodo, kiun la ludantoj atingas post 1000-taga ludo.
La ludo en 2018 ekhavis nur ĉ. 100 novajn demandojn, plurdekoj estis aktualigitaj kaj kvindeko forĵetita. Jarfine ni havis ĉ. 1600 demandojn.




Ekde la 6ª jaro en 2018 ni enkondukis kelkajn ŝanĝojn, nome: limigis la ludtagojn, kaj post 1400 tagoj neniu rajtas ludi. Same estis eksigitaj el la ludo tiuj, kiuj gajnis entute pli ol 12 fojojn, aŭ jare gajnas en 4 monatoj. Praktike ni lasas ĉiun ludi ĝis 1000 ludtagoj, kaj poste de tiuj, kiuj ŝatus ludi pliajn 400 tagojn, ni ŝatus ricevi monsubtenon, ja RISKO, precipe la sendado de donacoj kaj kelkaj partoj de la funkciigo, kostas monon.

El la 70 landoj en la unua pozicio Francio havas 147, en la sube montrata Hungario havas 25 ludantojn.

## Ludoj laŭ monatoj kaj jaroj

| Jaroj | Monatoj | | | | | | | | | | | | Entute |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | jan | feb | mar | apr | maj | jun | jul | aŭg | sep | okt | nov | dec | |
| **2018** | 1799 | 1600 | 1704 | 1056 | 1021 | 949 | 875 | 835 | 821 | 954 | 903 | 942 | **13459** |
| **2017** | 1405 | 1541 | 1684 | 1583 | 1645 | 1667 | 1534 | 1498 | 1611 | 1851 | 1723 | 1727 | **19469** |
| **2016** | 2687 | 2144 | 1981 | 1511 | 1527 | 1639 | 1471 | 1454 | 1354 | 1647 | 1573 | 1358 | **20346** |
| **2015** | 2448 | 2100 | 2344 | 2375 | 2349 | 2141 | 1937 | 2079 | 2445 | 2432 | 2368 | 2377 | **27395** |
| **2014** | 2352 | 2284 | 2344 | 2236 | 2167 | 2132 | 2226 | 2112 | 2164 | 2169 | 2289 | 2499 | **26974** |
| **2013** | 0 | 0 | 0 | 1550 | 2767 | 2415 | 2109 | 2189 | 2249 | 2490 | 2495 | 2426 | **20690** |

## Ludantoj laŭ monatoj kaj jaroj

| Jaroj | Monatoj | | | | | | | | | | | | Entute |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | jan | feb | mar | apr | maj | jun | jul | aŭg | sep | okt | nov | dec | |
| **2018** | 108 | 97 | 118 | 92 | 80 | 72 | 68 | 58 | 62 | 80 | 73 | 67 | **975** |
| **2017** | 94 | 111 | 100 | 108 | 109 | 105 | 115 | 104 | 111 | 112 | 101 | 106 | **1276** |
| **2016** | 165 | 150 | 118 | 94 | 103 | 110 | 112 | 105 | 106 | 103 | 97 | 91 | **1354** |
| **2015** | 136 | 118 | 140 | 163 | 139 | 126 | 121 | 121 | 150 | 130 | 130 | 132 | **1606** |
| **2014** | 149 | 138 | 125 | 153 | 142 | 127 | 131 | 122 | 137 | 133 | 147 | 160 | **1664** |
| **2013** | 0 | 0 | 0 | 290 | 216 | 168 | 149 | 145 | 150 | 149 | 161 | 154 | **1582** |

## III.2. KER-EKZAMENOJ https://edukado.net/ekzamenoj/ker

*2018 estis laŭkalendare la dek-unua ekzamenjaro, en kies fino ni atingis sume 2242 sukcesintojn.*

En la 11a kalendarjaro de la KER-ekzamenoj okazis entute 10 (9+1) memstaraj ekzamensesioj. La plus unu sesio estis la 7a tutmonda ekzamentago, dum kiu disvolviĝis ekzamenoj en 16 urboj de 10 landoj. En tiuj urboj ekzameniĝis entute 138 personoj kaj sukcesis 102.
Antaŭe ni havis apartan sesion en Greziljono (FR), Moskvo (RU), kaj Kuritibo (BR), post la tutmonda sesio aliajn en Raleigh (US), Liptovský Mikuláš (SK), Lisbono (PT), Badajoz (ES), San-Marino (SM), kaj fine de la jaro en Puebla de Zaragoza (MX).
Al la ekzamenoj dum la jaro aliĝis entute 268 personoj, el kiuj sukcesis 230 personoj (86%). La nombro de la fiaskintoj estis 38 (14 %).

La plej sukcesa lando ĉi-jare estis Sud-Koreio kaj Brazilo, kie sukcese ekzameniĝis po 28 personoj. La sekva plej diligenta lando estis Francio kun 25 sukcesintoj. Francio en 2018 havas fine de 2018 entute 529 diplomitojn.

Nepre menciendas, ke el la 11 jaroj de la ekzamenoj tiu ĉi estis la 4a plej nombra jaro, laŭ la sukcesintoj. Ekde 2012 observeblis laŭŝtupa falo de la kandidatnombro, kaj tiun tendencon en 2018 ni sukcesis turni, kaj havi pli multe da kandidatoj, ne nur kompare al la ĵus antaŭaj jaro, sed ni superis la nivelon de la kandidatoj de la antaŭaj 3 jaroj. La kresko okazis danke al pli forta varbado kaj pli da investita laboro. Bedaŭrinde multaj el la regulaj ekzamenlokoj elfalas pro manko de kandidatoj, sed bonŝance eblas trovi novajn lokojn, kiel ĉi-jare estis: Nov-Jorko, Montrealo, Ŝimonoseki (JP), Zaragoza el Pueblo, nova urbo en Meksiko, Liptosky Mikulas el Slovakio. Post plurjara provo ni sukcesis okazigi sesion finfine ankaŭ dum IJK, kio estis delonga deziro de TEJO. Dum la ekzamensesioj bone laboris kaj la malnovaj kaj la novaj lokaj organizantoj.



KK komencis trejni helpantojn, kiuj povis kaj povos helpi estonte en ekzamensesioj: Raul Garcia kaj Hans Becklin el Usono, Karina Oliveira el Brazilio, Nicolau Dols el Hispanio.
La sesioj en 2018 estis grandparte skribaj, sed okazis ankaŭ parolaj / kompleksaj ekzamenoj en Greziljono, Kuritibo, Raleigh, Lisbono, Badajoz, San-Marino, kaj dum la tutmonda ekzamentago en Nov-Jorko, Londono, La Chaux-de-Fonds.

**Kvanto de kandidatoj laŭ tempo (entute: 2242)**

| Jaroj | Monatoj | | | | | | | | | | | | Entute |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | jan | feb | mar | apr | maj | jun | jul | aŭg | sep | okt | nov | dec | |
| **2018** | 0 | 0 | 0 | 10 | 9 | **122** | 40 | 36 | 0 | 0 | 13 | 0 | **230** |
| **2017** | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | **109** | 52 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | **161** |
| **2016** | 0 | 0 | 0 | 23 | 0 | **94** | 18 | 0 | 0 | 0 | 16 | 13 | **164** |
| **2015** | 18 | 0 | 0 | 22 | **87** | 0 | 50 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | **177** |
| **2014** | 34 | 0 | 0 | 0 | **181** | 0 | 18 | 27 | 0 | 0 | 0 | 0 | **260** |
| **2013** | 0 | 0 | 0 | 22 | 0 | **210** | 29 | 10 | 0 | 0 | 18 | 0 | **289** |
| **2012** | 0 | 27 | 0 | 28 | 0 | **326** | 17 | 42 | 0 | 0 | 0 | 24 | **464** |
| **2011** | 0 | 13 | 0 | 34 | 31 | 0 | **125** | 18 | 0 | 5 | 0 | 0 | **226** |
| **2010** | 0 | 0 | 0 | 12 | 0 | 0 | **77** | 21 | 0 | 27 | 0 | 9 | **146** |
| **2009** | 0 | 0 | 0 | 12 | 13 | 0 | **59** | 0 | 10 | 0 | 0 | 23 | **117** |
| **2008** | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | **8** | **8** |

La nomojn de la sukcesintaj ekzamenitoj vi povas legi en nia FIERLISTO
[http://edukado.net/ekzamenoj/kandidatoj](http://edukado.net/ekzamenoj/kandidatoj)

| | Urbo | Lando | Dato | B1S | B1P | B1K | B2S | B2P | B2K | C1S | C1P | C1K | Sume |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | Baugé en Anjou | FR | 2018-04-28 | 0 | 0 | 3 | 2 | 0 | 3 | 0 | 0 | 2 | 10 |
| 2 | Moskvo | RU | 2018-05-19 | 3 | 0 | 0 | 4 | 0 | 0 | 2 | 0 | 0 | 9 |
| 3 | Kuritibo | BR | 2018-06-02 | 5 | 0 | 1 | 3 | 0 | 1 | 2 | 3 | 9 | 24 |
| 4 | Zaozhuang | CN | 2018-06-16 | 13 | 0 | 0 | 3 | 0 | 0 | 2 | 0 | 0 | 18 |
| 5 | Parizo | FR | 2018-06-16 | 0 | 0 | 0 | 1 | 0 | 0 | 3 | 0 | 0 | 4 |
| 6 | Londono | GB | 2018-06-16 | 0 | 0 | 1 | 0 | 0 | 1 | 0 | 0 | 3 | 5 |
| 7 | Guangzhou (Kantono) | CN | 2018-06-16 | 7 | 0 | 0 | 1 | 0 | 0 | 2 | 0 | 0 | 10 |
| 8 | Ĉenduo | CN | 2018-06-16 | 3 | 0 | 0 | 1 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | 4 |
| 9 | La Chaux-de-Fonds | CH | 2018-06-16 | 2 | 0 | 0 | 0 | 1 | 0 | 0 | 0 | 1 | 4 |
| 10 | Ŝimonoseki | JP | 2018-06-16 | 4 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | 1 | 0 | 0 | 5 |
| 11 | Montrealo | CA | 2018-06-16 | 0 | 0 | 0 | 1 | 0 | 0 | 4 | 0 | 0 | 5 |
| 12 | Toulouse | FR | 2018-06-16 | 0 | 0 | 0 | 2 | 0 | 0 | 3 | 0 | 0 | 5 |
| 13 | Recife | BR | 2018-06-16 | 7 | 0 | 0 | 2 | 0 | 0 | 1 | 0 | 0 | 10 |
| 14 | Fleury les Aubrais | FR | 2018-06-16 | 3 | 0 | 0 | 1 | 0 | 0 | 1 | 0 | 0 | 5 |
| 15 | Novjorko | US | 2018-06-16 | 1 | 0 | 0 | 0 | 0 | 2 | 0 | 0 | 0 | 3 |
| 16 | Seulo | KR | 2018-06-16 | 25 | 0 | 0 | 6 | 0 | 0 | 7 | 0 | 0 | 38 |
| 17 | Bogoto | CO | 2018-06-16 | 7 | 0 | 0 | 2 | 0 | 0 | 2 | 0 | 0 | 11 |
| 18 | Tokio | JP | 2018-06-16 | 3 | 0 | 0 | 2 | 0 | 0 | 2 | 0 | 0 | 7 |
| 19 | Piedmont | US | 2018-06-16 | 0 | 0 | 0 | 1 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | 1 |
| 20 | Raleigh | US | 2018-07-10 | 0 | 0 | 3 | 1 | 0 | 5 | 0 | 1 | 7 | 17 |
| 21 | Liptovský Mikuláš | SK | 2018-07-20 | 1 | 2 | 3 | 0 | 0 | 8 | 0 | 1 | 9 | 24 |
| 22 | Lisbono | PT | 2018-08-03 | 0 | 1 | 2 | 2 | 1 | 2 | 1 | 2 | 10 | 21 |
| 23 | Badajoz | ES | 2018-08-09 | 0 | 0 | 3 | 0 | 0 | 2 | 0 | 1 | 5 | 11 |
| 24 | San Marino | SM | 2018-08-23 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | 4 | 4 |
| 25 | Puebla de Zaragoza | MX | 2018-11-18 | 6 | 0 | 0 | 6 | 0 | 0 | 1 | 0 | 0 | 13 |
| Entute: | | | | 90 | 3 | 16 | 41 | 2 | 24 | 34 | 8 | 50 | 268 |


Bone sukcesis la 7a Tutmonda Ekzamentago

La 16an de junio okazis la 7a Tutmonda Ekzamentago. Al ĝi aliĝis 153 personoj el 10 landoj. Pli ol la duono de la kandidatoj (82 ekzameniĝintoj) venis el aziaj landoj. Entute en 16 lokoj atendis niaj kunlaborantoj la kandidatojn. La plej sukcesan varbadon faris la juna INHYE GIM, ELLA en Seulo kiu prelegante en pluraj universitataj grupoj kaj kluboj aligis 48 kandidatojn. Bedaŭrinde kaj ĉe ili kaj en Ĉinio en la ekzamentago okazis ankaŭ gravaj universitataj lingvoekzamenoj, tial 13 personoj el Ĉinio, Koreio, kaj Japanio pliaj 5 en Eŭropo ne trapasis la Esperanto-ekzamenon.

La fina nombro de kandidatoj estis 138, kaj tiel kune kun la pli fruaj sesioj en tiu ĉi jaro ni jam havas 178 ekzameniĝintojn. Detalojn pri la partoprenintaj landoj kaj urboj kaj estontaj ekzamensesioj bonvolu vidi en la sube elŝutebla artikolo, kiu ĵus aperis en la Revuo Esperanto.

La mallongaj impresoj: multaj junuloj, multe pli da viroj ekzameniĝis ol virinoj, multe pli da virinoj helpis ol viroj, multe da laboro, 6 novaj ekzamenurboj, tri el la nunaj studentoj el Poznan organizis sesion .... Vidu ĉion sur la amaso da fotoj en nia [fotoalbumo.](fotoalbumo)

## III.3. EKPAROLU! [https://edukado.net/ekparolu](https://edukado.net/ekparolu)




En 2018 *Ekparolu!* havis sian duan oficialan jaron.

El la 63 ekzameniĝintaj geonkloj laboris en tiu tempo 57 personoj el 27 landoj. Al la programo aliĝis 129 genevoj el 35 landoj. Ĝenerale la genevoj ricevas po 10 parolsesiojn, sed pluraj el la [56 finintoj](56 finintoj) havis 20, kelkfoje eĉ 30 sesiojn. Dekoj el ili trapasis KER-ekzamenojn, ekaktivis en la movado. Kvin eksnevoj dumtempe fariĝis geonkloj kaj nun ili helpas al la komencintoj per parolsesioj.

En la provperiodo niaj geonkloj okazigis 150 sesiojn. Ni ne havas aŭtomatan registraĵon pri tio, kiuj laboris en tiu tempo.

En 2017 ni okazigis precize 700 sesiojn, kaj en 2018 malpli, nur 513. Ni ne precize komprenas, kial la genevoj ne pli amase profitas el nia servo kaj kial ili ne uzas la okazon ekzerci sin en la parolado. Meze de decembro, [en la Zamenhofa- festo, ni havis skajpan](en la Zamenhofa- festo, ni havis skajpan)

diskutsesion kun geonkloj kaj genevoj, kaj ni venis al la konkludo, ke en 2019 ni devos pli vaste kaj pli intense informadi pri la servo kaj disvastigi ĝin. Espereble la novaj agadoj portos rezulton.
Ni proponas al ĉiu kursgvidanto direkti la kursanojn al *Ekparolu!* por ke ili havu okazon paroli kun diversaj personoj el la tuta mondo.
*Nia redakcio dankas ĉiujn kunlaborintajn geonklojn, el kiuj la 15 plej diligentajn ni aparte kolektis kaj planas premii per librodonacoj. Speciale laŭdendas* ***Vida Kulikauskiene*** *el Litovio, kiu en 2018 entute 73 fojojn donis lecionojn al la genevoj.*

Ekde 2018 juna brazila studento *Miguel Rocha Bento,* eksnevo kaj nun diligenta onklo, krome Margaret Zaleski-Zamenhof, kiu mem ekzercas sin pere de *Ekparolu!* entreprenis volontuli por plia progresigo de la programo.
Pliaj informoj kaj ligiloj al diversaj partoj de la programo estas ĉi tie: https://edukado.net/novajhoj?id=779
Kun Margaret Zaleski-Zamenhof ni pretigis informfilmeton pri la programo en tri lingvoj: Esperanto, franca kaj angla kaj ŝatus se ili disvastiĝus kaj allogus pliajn genevojn al la projekto**.**





https://www.youtube.com/watch?v=nESLIe2Q1jc

## *III.4. POZNAN: INTERLINGVISTIKAJ STUDOJ*

Edukado.net estas en laborkontakto kun la Interlingvistikaj Studoj en Poznan. Katalin Kováts jam de pli ol 10 jaroj partoprenas en la tiea laboro, gvidas la metodikan formadon de la studentoj, en ĉiu tria jaro de la studoj. La retejo jam de pluraj jaroj donas spacon en la KLERIGEJO, kie la studentoj de IS povas sekvi siajn studojn kaj inter la konsultiĝoj povas labori helpe de edukado.net.
ESF[5] (kunlabore kun UEA) krome taskis al Katalin gvidi la komisionon, kiu respondecas pri la aljuĝoj kaj disdonado de la studstipendioj de ESF.
Edukado.net helpis ankaŭ rekte en la kolektado de subtenmonoj, kiuj ekde 2017 devas iri al ESF , en la kampanjo AMU POZNANON, https://www.esperantic.org/eo/edukado/interlingvistikaj-studoj/amu-poznanon/. Kadre de tiu kampanjo ESF ĝis 2500 dolaroj duobligas la ricevitajn donacojn. Bedaŭrinde en la jaro 2018 ni ne sukcesis kolekti la donacsumojn, kvankam la studentoj plejparte venas el ekster Eŭropo kaj ili bezonus subtenon ne nur pro la studkotizoj sed ankaŭ pro siaj vojaĝkostoj. https://edukado.net/novajhoj?id=770






Se vi volas vidi kiuj ili estas, jen filmeto
https://www.facebook.com/165047250205457/videos/612433362517432/

## *III.5. ĈEESTAJ KURSOJ KAJ LABORO DUM UK*



La agado de edukado.net disvolviĝas ĉefe en la reto, sed jare plurfoje okazas, ke la redaktoro gvidas kursojn kaj trejnadojn en Esperanto-aranĝoj. La plej granda tia elpaŝo estas jam de 16 jaroj la kutimaj programoj: "Paroligaj kursoj" dum la universalaj kongresoj. Katalin Kováts kaj ŝia edzo Sylvain Lelarge okazigas tre popularajn lingvokursojn dumkongrese. La dumlecionaj aktivaĵoj baziĝas sur la ekzercoj kaj materialoj de la paĝaro, kaj tiel la aranĝo estas bona okazo ne nur por lerni novajn esprimojn kaj akiri novajn spertojn, sed ankaŭ por instruistoj kaj klubgvidantoj partopreni aŭ almenaŭ observi la lecionojn. La kursoj okazas en du grupoj.

Por komencantoj estas dum 4 tagoj 8 sinsekvaj lecionoj. Tiuj, kiuj partoprenas ĉiun lecionon fine ricevas atestilon. Por mezniveluloj, la alia kurso, por kies partopreno necesas minimume A2-lingvonivelo, estas 4 diversaj renkontiĝoj. La du lecionoj de la sama tago pli-malpli identas.

Dumkongrese Katalin mem partoprenis ankaŭ en la programoj de la Akademio, kaj prelegis pri *Ekparolu!* dum la tago de la lernejo, aranĝo de ILEI. En la duhora programo de la Kleriga Lundo Katalin gvidis preparsesion al la KER-ekzamenoj kaj Sylvain okazigis kun Hori Jasuo programon pri strangaj objektoj.



KER-aferoj: deĵorado ĉe la KER-tablo dum la movada foiro, la organizado de la KER-ekzamenoj, aligo kaj informado de la personoj, surloka reĝisorado de la skribaj, laboratoriaj kaj parolaj sesioj, presado de la dokumentoj kaj testoj. La KER-organizadon de la ekzamenoj faris Katalin Kovats, kunlaboris Sylvain Lelarge, kaj kontribuis pluraj ekzamenantaj kolegoj, inter kiuj menciendas du junuloj, Kariana Oliveira (BR), Hans Becklin kaj Raul Garcia (Usono).

## ***III.6. PROGRAMISTA LABORO KAJ KOSTOJ***

*Kvankam la retejo teknike fariĝis tre malnova kaj nepre baldaŭ renovigenda, en la jaro 2018 ni farigis nur la plej gravajn ŝanĝojn, plibonigojn en la ludo RISKO, modernigojn en kelkaj funkcioj de* Ekparolu! *kaj la kursejo. Ĉe la laboroj nia programisto jam priatentis la aferojn, kiuj estonte devos esti ŝanĝitaj.*

Printempe ni faris la jure devigajn paŝojn, kiujn la novaj privatecreguloj de la Eŭropa Unio preskribis.

Laŭ tio ni pretigis detalan priskribon pri tio, laŭ kiuj manieroj nia retejo kaj ties diversaj partoj traktas viajn informojn. Ni indikas la metodojn kaj paŝojn laŭ kiuj vi povas kontroli tiujn aferojn kaj plisekurigi viajn datumojn. En la priskribo estas indikitaj ankaŭ maniero kaj loko, kie vi povas nuligi vian membrecon kaj forlasi la paĝaron, se vi tion volas.

Ni petas vin viziti la paĝon kaj atenteme legi la dokumenton
ĉe: https://edukado.net/prie/privateco

*Danke al la nova kontrakto kun GAUS pri la nova gastejo de la servilo kaj la ĝisdatigo de la retejo, en 2018 ni apenaŭ havis paneon en la retservo. Kvankam la nova aranĝo kostos ĉ. 850 eŭrojn, ni renovigos la kontrakton ankaŭ por 2019. Tiun sumon, danke al grandanima subtenanto, ni senpene ricevis en 2018 kaj pere de ĝi ni povis garantii la funkciadon.*

## III.7. MONKOLEKTA KAMPANJO – ZAMENHOF-PUZLO



Okaze de nia datreveno en decembro 2017 ni lanĉis monkolektan kampanjon en la formo de vendado de puzlopecoj el la portreto de nia majstro. Por unu peco necesis pagi minimume 10 eŭrojn, sed estis subtenanto, kiu donis 500 eŭrojn por unu puzlo. Entute estis 120 pecetoj, sed bedaŭrinde ni ne sukcesis vendi ĉiujn pecojn ĝis la jarfino de 2017. Fakte dum la tuta jaro pluiris tiu kampanjo kaj nur fine de 2018 ni vendis la lastan pecon.
**Ni kolektis per ĝi 12 124,86 eŭrojn**, kiun sumon ni elspezos por la modernigo de la retejo.Tiuj laboroj komenciĝos en la jaro 2019.
La puzlopecojn aĉetis ĉirkaŭ cent diversaj personoj. La plej granda donaco venis de nia delonga subtenanto, **Synnöve Mynttinen el Finnlando**, de kiu ni ricevis 2400 eŭrojn en tiu periodo. La detalan raporton kaj la malkaŝitajn numerojn de la puzlopecoj vi povas vidi ĉe la jubilea paĝo: **https://edukado.net/prie/datreveno/2017**
Pro la naskiĝdatreveno de edukado.net en 2018 ni ne lanĉis apartan monkolektadon, sed jam pretas la ideo por kampanjo por 2019, kiu lanĉiĝos en marto de la nova jaro.

## *III.7. DANKON AL LA KUNLABORANTOJ KAJ AL ESF*

La redaktoro de edukado.net kore dankas ĉiujn, kiuj per informoj, materialoj kaj financaj kontribuaĵoj helpis la laboron, per informado kaj varbado diskonigis la servojn de la paĝaro aŭ dum UK asistis en la kursoj kaj ekzamenoj.
Aparta danko iru al ***Mogens Rude Andersen*** *(Danio) pro la helpo en RISKO, al* ***Robert Bogenschneider*** *(Finnlando) pro la laboro en la panteonaj prezentoj, al* ***Víctor Solé*** *(Katalunio),* ***Mónika Molnár*** *(Svislando) kaj* ***Sylvain Lelarge*** *pro la diligenta korektado per la ruĝa krajono. Multe helpis ankaŭ ĉiuj onkloj kaj onklinoj, kiuj disponigis sesiojn por la komencintoj.*
***Aparta danko al ESF,*** ***http://www.esperantic.org/en/home/****, usona fondaĵo, kiu ĝiras ĉiumonate honorarion al la redaktoro.*

## IV. PLANOJ POR LA JARO 2019

La ĉefaj agadoj en 2019 koncentriĝas ĉirkaŭ tri punktoj.

## *IV.1. TEKNIKAĴOJ PRI LA PAĜARO*

La lastaj grandaj transkonstruoj de la paĝaro efektiviĝis en 2011, antaŭ 8 jaroj. Tia periodo estas longa por retejo kaj multaj el la programoj eksmodiĝis.
Ni devas forlasi nian nunan maljuniĝintan servilon kaj transiri al nova, kie neniel povas funkcii la ĝis nun uzitaj kodoj de la paĝaro. Necesos konvertado de la datumbazo kaj antaŭ la transiro zorga testado. Ĉar ne eblas ŝanĝi la kodojn en la malnova servilo, kaj same ne eblas funkciigi la malnovan kodsistemon en la nova, la programisto devos krei transformigajn kaj transkodigajn skriptojn, kiuj poste rapide transmetos la aferojn, sinkronizos ĉion kaj konvertos la tuton al la ĝusta formo. Tiel ni evitos la neceson havi la paĝaron malŝaltita dum tre longa tempo.
Ni esperas, ke tiuj paŝoj senprobleme sukcesos kaj en la postaj monatoj ni povos efektivigi kelkajn modernigojn, ŝanĝojn, kaj eventuale komenci ellabori nian novan projekton. *"Paŝoj ĉirkaŭ la mondo"*
Por pli bone helpi la universitatajn kolegojn en la kursejo ni planas apartigi la lernejajn kursregistrojn kaj krei apartan formularon por la universitatoj, baze de la bezonoj de la koncernaj grupoj.
Por funkciigi daŭre la paĝaron kaj efektivigi novajn projektojn ni bezonas financan subtenon.
Tial ni kalkulas je la konsciaj kaj helpemaj membroj kaj petas tiujn, kiuj povas sin dediĉi al regula aŭ porokaza subteno, anoncu tion al la redaktoro. La ĝisnunaj tiutemaj informoj estas ĉe: https://edukado.net/prie/subteno kaj ties subpaĝoj.

## *IV.2. TREJNADOJ – DAŬRA KUNLABORO ANKAŬ KUN ILEI*

- En la jaro 2018 ricevis grandan atenton la trejnadoj kaj diversaj projektoj rilate al tio. En 2019 K. Kovats daŭrigos la retan trejnadon de la afrikanoj, kadre de la projekto EIT-Afriko kaj komencos dufoje unusemajnan trejnadon en Poznan, parte por la studentoj de la interlingvistikaj studoj, parte por aliĝintoj, kiuj nur por tiu lasta jaro, por la metodika trejnado aliĝos. Anoncon pri tio vidu ĉi tie: https://edukado.net/novajhoj?id=784
- En 2019 plu daŭros la helpo por la membroj de ILEI, nome je abono de IPR kaj je Juna Amiko edukado.net oferas al tiuj "*superaj membroj de ILEI*" dum 2019 liberan aliron al la instrumaterialoj de la retejo. En 2018 ne multaj profitis el tiu faciligo, esperebile estos pli bona jaro la nuna.
- En la sekcio KLERIGEJO en 2018 ni ne sukcesis lanĉi la serion de pedagogicelaj filmetoj, kiuj celas diskonigi kelkajn artifikojn, trukojn por instrui Esperanton kaj elvoki diskutojn. Ni komencos publikigi ilin en la autuno de 2019. La serion nutros filmetoj ne nur de Katalin Kovats, redaktoro, sed estos lanĉita ankaŭ konkurso kaj eblos sendi konkursaĵojn.
- Kvankam ne temas pri rekta trejnado, tamen gravegan metodologian laboron signifos la reredaktado de la *Manlibro pri Instruado de Esperanto*, kiun Katalin Kovats entreprenis kaj realigos dum la unua parto de la jaro 2019. Okazos gravaj modifoj en la nova manlibro, ŝanĝiĝos la strukturo, kelkaj artikoloj transiros al aliaj partoj, kaj pluraj novaj temoj eniros la libron.
  La *Manlibro* estos eldonita de ILEI kaj E@I, sed laŭplane estos elŝutebla ankaŭ senpage en la retejo de ILEI kaj edukado.net.

## IV.3. RISKO ***https://edukado.net/ludoj***

La RISKO-ludo en aprilo fariĝos 6-jara. Ĝi estas la plej populara ero de la paĝaro.
En 2018 ni enkondukis kelkajn ŝanĝojn, ĉefe limigojn de la ludtagoj.
En 2019 ni planas aldoni ĉ. 100 novajn demandojn, precipe pri la aktualaĵoj kaj gravaj atingaĵoj de tiu ĉi jaro. Pliajn ŝanĝojn kaj investojn pri RISKO ni ne planas fari en 2019.
Ekde 2018 ni ne plu anoncis ĉiun monaton la ganintojn, sed faris tiun post ĉiuj 3 monatoj. Ni daŭrigos tiun kutimon kaj premios nur la venkintojn. La donacebloj ne estos pludoneblaj. Ni devas ŝpari, ĉar plej ofte la sendokostoj tro pezas en nia buĝeto. En 2018 venis ĉ. 10 tiucelaj mondonacoj aŭ pagoj, kiuj estis celitaj por la ludo.

## IV.4. KER-EKZAMENOJ ***https://edukado.net/ekzamenoj/ker***

La redaktoro de edukado.net daŭre prizorgis, kiel estro de la Konstanta Ekzamena Sekcio (KES) de UEA, la organizadon kaj realigon de la KER-ekzamenoj.
Tiu laboro portas iom da mono ankaŭ por la retejo, ĉar UEA pagas po unu eŭron post ĉiu ekzamenaliĝinto kaj po 5 eŭrojn post ĉiu lanĉita sesio. Tiu mono ne estas honorario por la redaktoro, sed estas rekompenco por la uzo de la retejo kaj ties programoj kaj servoj.
KK planas okazigi la 8an Tutmondan Sesion (la 15an de junio), sesiojn pri internaciaj aranĝoj kaj kursoj kiel IJK, IJF, NASK, dum UK en Finnlando kaj kelkajn aliajn apartajn sesiojn. La celo estas atingi almenaŭ 200 sukcesintojn kaj envolvi en la ekzamenkampanjon pli da novaj lokoj kaj landoj.
Fine de 2018 estis entute 2442 KER-sukcesintoj el 74 landoj.
La iom idealisma celo por 2019 estas atingi pliajn 250 sukcesintojn.

## *IV.5. KONTAKTOJ, KUNLABOROJ*

- Antaŭvideblas kunlaboro inter UEA kaj Edukado.net por la organizo de la KER-ekzamenoj (kio okazis ĝis nun senkontrakte) kaj por la okazigo de la paroligaj kursoj dum UK-oj.
- Okazos plua sukcesa kunlaboro kun ILEI. Katalin Kovats reredaktos la *Manlibron* kaj partoprenos en kelkaj aranĝoj, sed certe ne vojaĝos ĉi-jare al la ILEI-kongreso.
- Ĝenerale imageblas kunlaboroj kun landaj asocioj, kluboj, aranĝoj, se ili volas helpon de edukado.net por aranĝoj kaj trejnadoj. Depende de la laborfortoj, la redaktoro certe respondas al tiurilataj petoj.

## IV.6. KURSEJO *https://edukado.net/kursejo*

Ni daŭrigos la fortan stimuladon de la kolegoj je registrado de kursoj. Ankaŭ en 2019 la sekcio *Instrumaterialoj* estos malfermita por tiuj, kiuj registras siajn kursojn kaj agadojn.
En 2018 estis plibonigo de la kursa registrado, precipe en la kampo de la instrumaterialoj.
La kolegoj ofte turnas sin al la redaktejo petante konsilojn kaj pretajn kursmaterialojn.

## IV.7. EKPAROLU! **https://edukado.net/ekparolu**

En la tria aktiva jaro de la programo ni planas lanĉi eĉ pli da reklamoj ol ni faris antaŭe kaj trovi genevojn, kiuj vere ne nur aliĝas, sed ankaŭ mendas sesiojn. Ĝenerala rimarko estas, ke necesas diskonigi la servojn, daŭre okupiĝi pri informado, dum aranĝoj kaj tra revuoj, kaj diversaj retaj ebloj. Necesas klarigi por instruantoj kiel efike uzi *Ekparolu!* kiel kompletigajn rimedojn por paroligo. Ni planas havi en Finnlando apartan tablon ĉe la Movada Foiro, kiun prizorgos Margaret Zaleski-Zamenhof kaj kelkaj geonkloj kaj genevoj por disvastigi tie la servojn.
Ni volas daŭre premii niajn plej diligentajn geonklojn kaj serĉas donacojn por ili.
Observeblas, ke venas al la retejo donacoj de geonkloj kaj genevoj. Tiuforman rekompencon de la genevoj ni daŭre bonvenigos.
https://edukado.net/ekparolu/subtenantoj

## IV. 8. KLERIGEJO – LIBERAJ STUDOJ *https://edukado.net/klerigejo*

Lastatempe kreskis la intereso pri la kurs- kaj prelegmaterialoj de la Klerigejo. En la dua parto de 2019 ni lanĉas kampanjon por riĉigi la kolekton de prelegoj kaj kursoj kun testoj, pli da atento ni donos al la parto *Liberaj studoj*, kiu funkcias kvazaŭ nia popoluniversitato. Ni planas specialan serion, en kiu oni povas prezenti sian hobion kaj instrui pri metioj, kompreneble en Esperanto. Alia kolekto estos prezentoj de loĝlokoj, turismaj priskriboj de urboj, vidindaĵoj. Tiuj materialoj formos bazon de nia nova projekto *Paŝoj ĉirkaŭ la mondo.*

## IV.9. NI SERĈAS HELPANTOJN POR DIFINITAJ TASKOJ

La taskoj kaj la laboro pri la paĝaro lastatempe tiugrade kreskis, ke unusola persono ne plu povas manaĝi ĉiun parton. Tage plurcent mesaĝoj venas al la redaktejo el kiuj cento certe bezonas esti tuj respondata. Ankaŭ pro sekurecaj kialoj necesas, ke ekestu pli da personoj, kiuj konas la funkciadon de la retejo. Por la sekvaj taskoj bonvenus helpantoj:

- Provlegado de ekzercoj, ilia enpaĝigo
- Prizorgado de la panteonaj prezentoj
- Korespondado kun la genevoj de Ekparolu!, ilia kuraĝigo
- Registrigo de kursoj
- Serĉado de nefunkciantaj ligoj (por programistoj verŝajne facila tasko.)
- Kreado de testoj por kontroli komprenkapablon
- Programista tasko por nia nova projekto *Paŝoj ĉirkaŭ la mondo*
- Redaktoro de raportoj, senditaj de dumaranĝaj raportistoj, speciale en julio.

## V. FINANCOJ

### *V.1. ĜENERALA KLARIGO*

La monrimedoj, kiujn la Fondaĵo mastrumas, normale devenas de la sponsoroj kaj donacintoj en formo de mondonacoj. Krom la banka interezo - kiu estas sensignifa sumo - la Fondaĵo ĝenerale ne havas alian enspezon, pro tio ricevis de la nederlandaj instancoj la statuson de ne-profitcela, bonvola organizaĵo, danke al kio ni ne devas pagi impostojn.

En 2018, al la konto de la Fondaĵo Edukado.net, enfluis ankaŭ aliaj montipoj, pri kiuj pretiĝis aparta administro.

- Ni decidis ne plu kolekti monhelpon por la studentoj en Poznan, sed ni ankoraŭ gardas kaj okaze de bezono ni mastrumas la pli fruajn sumojn.
- Nia alia celorientita donacdirekto estis akcepti monon por subteni kandidatojn de la KER-ekzamenoj. Tiucele ni ne ricevis donacon en 2018, sed el la pli fruaj sumoj ni subtenis kolombiajn kandidatojn en valoro de 93 eŭroj.
- Por la servilkostoj por 2018 ni trovis sponsoron el Britio, kiu en unu pago kovris la kostojn de 750.89 eŭroj. Por 2019 la kostoj estas la samaj kaj ni denove esperas ricevi monhelpojn por tiu sumo.
- Nia retejo daŭre bezonas riparojn, renovigojn de malnovaj kodsistemoj, kaj modernigojn de kelkaj bazaj funkcioj. Proksimiĝas la tempo, kiam la plej grandan parton de la retejo ni devos renovigi, kaj por tiuj laboroj ni devas multe ŝpari.
- Ni havas bankokontojn (Rabobank kaj PayPal), sed el la kostoj de tiuj kontoj ni kalkulas nur la kostojn de Rabobank. La kostojn de la PayPal-konto ni ne kalkulas, ni administras nur la pure ricevitajn sumojn.
- Altas ankaŭ la poŝtokostoj, speciale ekde 2018, kiam donacojn por RISKO kaj Ekparolu! ni devas plejparte poŝte sendi.
- Elspezo estas la membrokotizo ĉe ANBI (por la administrado de nia statuso de senprofita, bonvola organizaĵo, kiu ne bezonas pagi imposton en Nederlando),
- En 2018 ni ne produktigis presitajn informmaterialojn kaj varbilojn, nur reklamskribilojn, kun teksto pri *Ekparolu!*, kiujn ricevas la geonkloj. Dum kelkaj aranĝoj ni disdonis la libron *Poŝamiko*: al ĵurnalistoj, al aktoroj, kiuj konceptigis teatraĵon pri Eo, al gajnintoj de ĉeestaj RISK-ludoj k.s.
- Ĉar la redaktora laborejo efektive troviĝas en la hejmo de Katalin, ni ne havas elspezon por oficejo kaj ties devigaj elspezoj, sed kalkulas en la buĝeto iom da *burokostoj* (kurento, reto, telefono).

### V.2. ENSPEZOJ EN 2018

*Por konservi la statuson de ne-profitcela fondaĵo, la subvencimonon, kiun ESF disponigas por la redaktora honorario kaj vojaĝj, ni ne enirigas en la buĝeton de la Fondaĵo, sed pri tio ni havas apartan kontrakton inter E-duKati kaj ESF.*

En la jaro 2018 la sumo, kiun la Fondaĵo ricevis pere de la 113-fojaj donacoj (en 2017 estis nur 149 fojaj donacoj de diversaj personoj) estis **10327.24** eŭroj (en 2017 la sumo estis 11 852, 63 eŭroj).

Krom donacoj, la fondaĵoj havas nur etan enspezon, ekstreme magran bankan interezon (2,02 eŭrojn dum la tuta jaro!!!) kaj pro la administraj kaj retaj kostoj venas en la kason mono (427 eŭroj) danke al la KER-ekzamenoj.

*Analizante la donackutimojn, ni povas konstati, ke el inter la donacintoj estas 3 (unu individuo kaj unu asocio, ambaŭ el Belgio kaj unu individuo el Finnlando) kiuj regule sendis monatan kontribuon. Bedaŭrinde en la jaro 2018 finiĝis la signifa subteno el Finnlando. Estas ankoraŭ 3-4 personoj, kiuj jare plurfoje sendas subtenmonon. Estas nepre rimarkende, ke pluraj el la genevoj de la programo* Ekparolu! *honoras nin per donaco, kvankam ili scias bone, ke la servo estas senpaga, sed tute ne senkosta por nia retejo. El la mono ni ne nur la konstrukostojn provas malaltigi, sed sukcesis organizi sendadon de indaj donaclibroj por la 15 plej aktivaj geonkloj.*

*https://edukado.net/ekparolu/onkloj/premioj*
*Bedaŭrinde en multe malpli granda nombro observeblas financa kontribuo de la membroj, kiuj regule, eĉ ĉiutage, jam de jaroj ludas kaj kleriĝas en la ludo RISKO. Malgraŭ tio, ke ankaŭ tie ni komence anoncis donacojn, ties sendadon por la anstataŭantoj de la veraj venkintoj ni ĉi-jare ne povis sendi.*

*Estas domaĝe, ke ni ne sukcesis plivastigi la nombron de tiuj, kiuj promesis regule per konkreta sumo subteni la paĝaron, tiel ekde aprilo 2018 ni planas ricevi monon pere de la RISKO-ludo kaj komenci igi la uzantojn de la retejo je mondonacado.*

## V.3. REGULAJ SUBTENANTOJ BEZONATAS

*Por daŭrigi nian laboron, ni bezonas regulan enspezon. Jam sufiĉus, se kelkcent esperantistoj decidus dediĉi ĉiujare malgrandan sumon al la subteno de nia paĝaro.*
*Do, iĝu unu el niaj regulaj subtenantoj, por minimume tri jaroj!*
*Flankenmetu ĉiumonate la prezon de kelkaj kafoj, glaciaĵoj aŭ cigaredoj kaj sendu la sumon al ni jarfine.*
***Jen la FORUMA parto, kie eblas anonci vian engaĝiĝon**.*
*http://edukado.net/komunumo/forumo?f=536&p=1*
*Helpu nin helpi vin.* ***La pageblojn vi povas trovi*** *sur la paĝaro: http://edukado.net/prie/subteno*

## *V.4. VOJAĜOJ*

Estas interese mencii, ke **en 2018 la redaktoro vojaĝis por kursumado entute 20030 kilometrojn.** Ŝi uzis plejparte aviadilon por eksterlandaj vojaĝoj kaj trajnon por enlandaj.

Ni devis iom elspezi por kelkaj veturoj de la redaktoro por partopreni aranĝojn, kie la retejo prezentiĝis oficiale aŭ kie ŝi kontribuis sen esti financata de la organizantoj de la aranĝo. Tiuj veturkostoj celas ĉefe enlandajn kostojn (Hago-Roterdamo-Amsterdamo). Normale la vojaĝkostojn al lokoj, kie la redaktoro prelegas aŭ kontribuas, ni povas kaj sukcesas pagigi de la invitintoj.
**Vojaĝojn al UK neniam ni pagis al la teamanoj el la fondaĵa mono**. Por tiuj en 2018 UEA financis flugon de unu persono inter Amsterdamo kaj Lisbono. Katalin Kovats **mem financis sian flugon** al Madrid (ILEI-kongreso), de tie al Lisbono, kaj ESF pagis la reflugon el Lisbono.
ESF financis ankoraŭ du aliajn vojaĝojn de la redaktoro, vidu ilin en la sekva punkto.
La enlandajn vojaĝojn kaj duonon de la flugbiletoj al la ILEI-kongreso financis Katalin Kovats mem.

## V.5. MULTFLANKA SUBTENO DE ESF

Esperantic Studies Foundation, kiel jam de 18 jaroj ankaŭ ĉi-jare, per honorario subtenis la redaktoran laboron. Krom tio kontribuis al la vojaĝo de la redaktoro, por ke ŝi povu veturi al Poznan kaj helpi tie en la Interlingvistikaj Studoj, financis la vojaĝon de Katalin al Aalen, por ke ŝi povu ĉeesti la premiadon de Ilona Koutny. ESF gastigis Katalin dum la Nitobe Simpozio en Lisbono kaj pagis ŝian revojaĝon de tie al ŝia hejmo. Tiuj sumoj venis al UEA-kontoj, kelkfoje eniris la konton de la fondaĵo, sed ne kalkuliĝas kiel donacoj aŭ enspezoj, same kiel la menciitaj vojaĝoj ankaŭ ne aperas kiel elspezoj de la fondaĵo.

## V.6. DONACOJ POR EDUKADO.NET EN LA JARO 2018

[https://edukado.net/prie/subteno/listo](https://edukado.net/prie/subteno/listo)

| | Nomo | Lando | Sumoj ĝiritaj | netaj | Dato | Maniero |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | *Margareta Symoens (monata subteno)* | *Belgujo* | *10.00* | *10.00* | *2018-12-31* | Rabobank |
| 2 | *HEINZ WILHELM SPRICK* | *Germanujo* | *30.00* | *30.00* | *2018-12-31* | Rabobank |
| 3 | *Monika Molnar* | *Svislando* | *50.00* | *50.00* | *2018-12-31* | Rabobank |
| 4 | *Bert de WIT* | *Nederlando* | *200.00* | *200.00* | *2018-12-24* | Rabobank |
| 5 | *Nancy Fontannaz* | *Svislando* | *50.00* | *50.00* | *2018-12-22* | UEA |
| 6 | *Anne Jausions* | *Francujo* | *36.00* | *36.00* | *2018-12-20* | UEA |
| 7 | *Bart Demeyere* | *Belgujo* | *500.00* | *500.00* | *2018-12-20* | Rabobank |
| 8 | *Jean-Marc Lugrin* | *Svislando* | *30.00* | *28.24* | *2018-12-* | PayPal |
| 9 | *Pauline Higgins* | *Britujo* | *5.00* | *4.48* | *2018-12-* | PayPal |
| 10 | *Magdaléna Feifičová* | *Slovakujo* | *15.00* | *15.00* | *2018-12-14* | UEA |
| 11 | *Margaretha Symoens (Puzlo-numero 104)* | *Belgujo* | *40.00* | *40.00* | *2018-12-11* | Rabobank |
| 12 | *Franz Franz Knöferl (Zamenhof-puzlo nr. 116.)* | *Germanujo* | *500.00* | *500.00* | *2018-12-11* | Rabobank |
| 13 | *Anonima* | *Britujo* | *15.00* | *14.14* | *2018-12-* | PayPal |
| 14 | *Anonima* | *Britujo* | *650.00* | *627.55* | *2018-12-* | PayPal |
| 15 | *Kristen Beems (Zamenhof-puzlo nr. 118)* | *Usono* | *50.00* | *47.45* | *2018-12-* | PayPal |
| 16 | *Katja Lödör (puzlo nr. 97.) (Regula subteno)* | *Belgujo* | *200.00* | *200.00* | *2018-12-07* | UEA |
| 17 | *Katja Lödör (Zamehof-puzlo nr. 108.)* | *Belgujo* | *50.00* | *50.00* | *2018-12-07* | UEA |
| 18 | *Peter Baláž (Zamenhof-puzlo nr. 102)* | *Slovakujo* | *10.00* | *10.00* | *2018-12-07* | UEA |
| 19 | *Franz Knöferl (Zamenhof-puzlo nr. 94.)* | *Germanujo* | *500.00* | *500.00* | *2018-12-05* | Rabobank |
| 20 | *3000 VZW (monata subteno) (Puzlonumero 110)* | *Belgujo* | *10.00* | *10.00* | *2018-12-04* | Rabobank |
| 21 | *Margaretha Symoens (monata subteno)* | *Belgujo* | *10.00* | *10.00* | *2018-12-04* | Rabobank |
| 22 | *Alfred Santacana Gassull (Z-puzlo nr. 92)* | *Hispanujo* | *15.00* | *14.14* | *2018-12-* | PayPal |
| 23 | *Maurizio Giacometto (Z-puzlo nr 120)* | *Britujo* | *20.00* | *18.97* | *2018-11-* | PayPal |
| 24 | *Ineke Emmelkamp (Zamenhof-puzlo 90)* | *Nederlando* | *50.00* | *50.00* | *2018-11-21* | UEA |
| 25 | *Synnöve Mynttinen (puzlonumero 119)* | *Finnlando* | *1000.00* | *1000.00* | *2018-11-20* | Rabobank |
| 26 | *CLAUDE BENSIMON (Puzlonumero 98)* | *Francujo* | *25.00* | *25.00* | *2018-11-13* | Rabobank |
| 27 | *Aristides Delgado Yanes (Z-puzlo 93)* | *Hispanujo* | *20.00* | *18.97* | *2018-11-* | PayPal |
| 28 | *Kamil Getka* | *Pollando* | *5.00* | *4.48* | *2018-11-* | PayPal |
| 29 | *3000 VZW (monata subteno)* | *Belgujo* | *10.00* | *10.00* | *2018-11-04* | Rabobank |
| 30 | *Margaretha Symoens (monata subteno)* | *Belgujo* | *10.00* | *10.00* | *2018-11-03* | Rabobank |
| 31 | *Luigia Oberrauch (Z-puzlo nr 86.)* | *Italujo* | *100.00* | *100.00* | *2018-10-25* | UEA |
| 32 | *José Ignacio Orejas Pérez (Z-puzle nr. 91)* | *Hispanujo* | *20.00* | *20.00* | *2018-10-13* | UEA |
| 33 | *Maurizio Giacometto (Z-puzle, nr.99)* | *Britujo* | *10.00* | *9.31* | *2018-10-* | PayPal |
| 34 | *Zofia Rogalska (Z-puzlo 89)* | *Pollando* | *30.00* | *30.00* | *2018-10-11* | Kontante |
| 35 | *James Higgins* | *Britujo* | *5.00* | *4.48* | *2018-10-* | PayPal |
| 36 | *Henrique Knoedt (Puzlo 70)* | *Brazilo* | *30.00* | *28.03* | *2018-10-* | PayPal |
| 37 | *Sheila Devlin (Puzle 69.)* | *Usono* | *50.00* | *47.45* | *2018-10-* | PayPal |
| 38 | *Ilona Koutny de UAM (Puzlo 64.)* | *Pollando* | *300.00* | *300.00* | *2018-10-05* | UEA |
| 39 | *Maryse Zaleski-Zamenhof (Puzlo nr. 76)* | *Francujo* | *100.00* | *96.25* | *2018-10-* | PayPal |
| 40 | *3000 VZW (monata subteno)* | *Belgujo* | *10.00* | *10.00* | *2018-10-02* | Rabobank |
| 41 | *Margaretha Symoens (monata subteno)* | *Belgujo* | *10.00* | *10.00* | *2018-10-01* | Rabobank |
| 42 | *Asocio ARMOR ESPERANTO El Bretonio (Puzlo 62)* | *Francujo* | *500.00* | *500.00* | *2018-09-27* | Rabobank |
| 43 | *Patrick Morando (Puzlo 61.)* | *Italujo* | *30.00* | *30.00* | *2018-09-17* | Rabobank |
| 44 | *3000 VZW (monata subteno)* | *Belgujo* | *10.00* | *10.00* | *2018-09-04* | Rabobank |
| 45 | *Andrea Bertrand (por Kunvojaĝu) Puzle 21* | *Francujo* | *50.00* | *50.00* | *2018-09-03* | UEA |
| 46 | *Margaretha Symoens (monata subteno)* | *Belgujo* | *10.00* | *10.00* | *2018-09-02* | Rabobank |
| 47 | *Jindřiška Drahotová por RISKO* | *Ĉeĥujo* | *15.00* | *15.00* | *2018-08-27* | Rabobank |
| 48 | *Martine Demouy por la Kunvojaĝu-kompleto* | *Francujo* | *10.00* | *10.00* | *2018-08-04* | Rabobank |
| 49 | *Margaretha Symoens (monata subteno)* | *Belgujo* | *10.00* | *10.00* | *2018-08-02* | Rabobank |
| 50 | *3000 VZW (monata subteno)* | *Belgujo* | *10.00* | *10.00* | *2018-08-02* | Rabobank |
| 51 | *Harm Voortman (Z-puzlo nr 63.)* | *Nederlando* | *15.00* | *15.00* | *2018-07-31* | Rabobank |
| 52 | *Betty Chatterjee (Puzlo nr. 71.)* | *Danujo* | *10.00* | *9.31* | *2018-07-* | PayPal |
| 53 | *3000 VZW (monata subteno)* | *Belgujo* | *10.00* | *10.00* | *2018-07-06* | Rabobank |
| 54 | *Margaretha Symoens (monata subteno)* | *Belgujo* | *10.00* | *10.00* | *2018-07-06* | Rabobank |
| 55 | *Ingebjørg Rambjør (regula jara subteno) (Puzlo 73)* | *Norvegujo* | *1000.00* | *1000.00* | *2018-07-03* | Rabobank |
| 56 | *Daniel Calvos (Puzlo 74)* | *Francujo* | *30.00* | *30.00* | *2018-06-25* | Rabobank |
| 57 | *Aristides Delgado Yanes (Puzlo 79)* | *Hispanujo* | *30.00* | *28.63* | *2018-06-* | PayPal |
| 58 | *Aristides Delgado Yanes* | *Hispanujo* | *30.00* | *28.63* | *2018-06-* | PayPal |
| 59 | *Humiko Okada (Puzlo nr. 87 anstataŭ 11)* | *Japanujo* | *95.24* | *95.24* | *2018-06-13* | UEA |
| 60 | *Margaretha Symoens (monata subteno)* | *Belgujo* | *10.00* | *10.00* | *2018-06-04* | Rabobank |
| 61 | *3000 VZW (monata subteno)* | *Belgujo* | *10.00* | *10.00* | *2018-06-04* | Rabobank |

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 62 | Maud CHARBONNEAU | Francujo | 10.00 | 9.31 | 2018-05- | PayPal |
| 63 | Maud CHARBONNEAU (Z-puzlo 107.) | Francujo | 30.00 | 28.63 | 2018-05- | PayPal |
| 64 | Yevgeniya Amis (Puzlo 85) | Kanado | 25.00 | 25.00 | 2018-05-29 | UEA |
| 65 | Jean-Pierre Boulet (Z-puzlo nr. 105) | Francujo | 45.00 | 45.00 | 2018-05-24 | UEA |
| 66 | LE ROUX BERNARD (Z-puzlo nr. 55) | Francujo | 30.00 | 28.63 | 2018-05- | PayPal |
| 67 | Randall Hron (Z-puzlo nr. 49) | Usono | 20.00 | 18.77 | 2018-05- | PayPal |
| 68 | 3000 VZW (monata subteno) | Belgujo | 10.00 | 10.00 | 2018-05-03 | Rabobank |
| 69 | Maurizio Giacometto (Z-puzlo nr. 51) | Britujo | 10.00 | 9.31 | 2018-05- | PayPal |
| 70 | Margaretha Symoens (monata subteno) | Belgujo | 10.00 | 10.00 | 2018-04-30 | Rabobank |
| 71 | Verla Viera (Z-puzlo nr. 39) | Usono | 50.00 | 47.45 | 2018-04- | PayPal |
| 72 | Aristides Delgado Yanes (Z-puzlo nr. 57) | Hispanujo | 10.00 | 9.31 | 2018-04- | PayPal |
| 73 | Walter Schultz (Z-puzlo 58.) | Usono | 162.33 | 154.84 | 2018-04- | PayPal |
| 74 | Imre Keményfi (Pizlo 34.) | Hungarujo | 15.00 | 15.00 | 2018-04-06 | Rabobank |
| 75 | 3000 VZW (monata subteno) | Belgujo | 10.00 | 10.00 | 2018-04-04 | Rabobank |
| 76 | Palma Csiszar (Risko - Puzlo 75.) | Hungarujo | 30.00 | 30.00 | 2018-04-03 | Rabobank |
| 77 | Andreas Emmerich (Z-puzlo 52.) | Germanujo | 52.00 | 52.00 | 2018-04-03 | Rabobank |
| 78 | Laure PATAS DILLIERS (Puzlo 19.) | Francujo | 10.00 | 9.31 | 2018-04- | PayPal |
| 79 | Paula Niinikorpi (Z-puzlo 36.) | Finnlando | 52.00 | 52.00 | 2018-04-01 | UEA |
| 80 | Heinz-Wilhelm Sprick (Z-puzlo 56.) | Germanujo | 22.00 | 20.9 | 2018-03- | PayPal |
| 81 | Margaretha Symoens (monata subteno) | Belgujo | 10.00 | 10.00 | 2018-03-29 | Rabobank |
| 82 | Synnöve Mynttinen (servil- kaj bankkostoj) Puzlo 31. | Finnlando | 900.00 | 900.00 | 2018-03-27 | Rabobank |
| 83 | Piret KELGO Luule (Ekparolu!) (Z-puzlopeco nr. 22) | Estonujo | 50.00 | 50.00 | 2018-03-26 | Rabobank |
| 84 | Samuel Crosby (Z-puzlo nr 114) | Usono | 30.00 | 28.33 | 2018-03- | PayPal |
| 85 | Sheila Devlin (Z-puzlo 100 - Por Ekparolu!) | Usono | 30.00 | 28.33 | 2018-03- | PayPal |
| 86 | 3000 VZW (monata subteno) | Belgujo | 10.00 | 10.00 | 2018-03-09 | Rabobank |
| 87 | Esperanto-Lingvoklubo Aŭgsburgo (Z-puzlo 77.) | Germanujo | 500.00 | 500.00 | 2018-03-09 | Rabobank |
| 88 | Margaretha Symoens (monata subteno) | Belgujo | 10.00 | 10.00 | 2018-03-02 | Rabobank |
| 89 | Ejnar Rosen Hjorth (Z-puzlo nr 30.) | Danujo | 100.00 | 100.00 | 2018-02-18 | UEA |
| 90 | Gisela Macioszek (Z-porterto 28. + Ekparolu) | Germanujo | 150.00 | 150.00 | 2018-02-15 | UEA |
| 91 | Synnöve Mynttinen (por monata subteno) | Finnlando | 200.00 | 200.00 | 2018-02-08 | UEA |
| 92 | 3000 VZW (monata subteno) | Belgujo | 10.00 | 10.00 | 2018-02-06 | Rabobank |
| 93 | ANJA KUHANEN (Z-puzlo 46.) | Finnlando | 100.00 | 100.00 | 2018-02-06 | Rabobank |
| 94 | Margaretha Symoens (monata subteno) | Belgujo | 10.00 | 10.00 | 2018-02-06 | Rabobank |
| 95 | Mariusz Hebdzyski (Z-puzlo 88.) | Pollando | 12.00 | 11.24 | 2018-01- | PayPal |
| 96 | SylviaHämäläinen-Jara subteno/Ekparolu!puzlo 25.) | Finnlando | 120.00 | 120.00 | 2018-01-25 | Rabobank |
| 97 | Wilmer - Aura Amparo Guevara Morales (puzlo 54.) | Kolombio | 50.00 | 46.95 | 2018-01- | PayPal |
| 98 | Gerald Tucker (Z-puzlo 82.) | Germanujo | 50.00 | 50.00 | 2018-01-24 | UEA |
| 99 | Griffin Finkenstein | Germanio | 35.00 | 35.00 | 2018 01-15 | Rabobank |
| 00 | Mogens Rude Andersen | Danio | 20.00 | 20.00 | 2018-06-15 | UEA |
| 101 | Aristides Delgado Yanes (Z-puzlo 45.) | Hispanujo | 10.00 | 9.31 | 2018-01- | PayPal |
| 102 | Anonima D.G. (Z-puzlo 24.) | Svislando | 210.00 | 199.78 | 2018-01- | PayPal |
| 103 | Ruth Cohen (Z-puzlo 43.) | Usono | 25.00 | 23.55 | 2018-01- | PayPal |
| 104 | 3000 VZW (monata subteno) 3000 (Z-puzlo 96.) | Belgujo | 10.00 | 10.00 | 2018-01-08 | Rabobank |
| 105 | Margaretha Symoens (monata subteno) (Z-puzlo 44.) | Belgujo | 10.00 | 10.00 | 2018-01-08 | Rabobank |
| 106 | A. A. Pijnacker (Z-Puzlo 6) | Nederlando | 25.00 | 25.00 | 2018-01-08 | UEA |
| 107 | Piret KELGO Luule ( Por Ekparolu!) (Z-puzlo 115) | Estonujo | 50.00 | 50.00 | 2018-01-08 | Rabobank |
| 108 | Synnöve Mynttinen (monata subteno) (Z-puzlo 67) | Finnlando | 200.00 | 200.00 | 2018-01-08 | Rabobank |
| 109 | Hossein Firooznia (Z-puzlo 5. ) | Usono | 50.00 | 47.45 | 2018-01- | PayPal |
| 110 | Ricardo Biurrun Gonz (Z-puzlo 59.) | Hispanujo | 25.00 | 23.8 | 2018-01- | PayPal |
| 111 | Aranka Laslo (Z-puzlo 16.) | Serbujo | 10.00 | 10.00 | 2018-01-03 | UEA |
| 112 | Sara Spanò (Z-puzlo 81.) | Italujo | 25.00 | 25.00 | 2018-01-02 | Rabobank |
| 113 | Francesco Maurelli (Z-puzlo 84.) | Italujo | 25.00 | 25.00 | 2018-01-02 | Rabobank |
| 114 | Derek Roff (Z-puzlo 42.) | Usono | 50.00 | 47.45 | 2018-01- | PayPal |
| 115 | Alex Santos (Puzlo-numero 115) | Brazilo | 15.00 | 13.84 | 2018-01- | PayPal |
| | **2018**<br>En 2017 | | **10416,57**<br>11979.93 | 10327.24<br>**11852.63** | | |

Se vi sendis monon kaj ne trovas vin en la listo, bv tuj kontakti la redaktoron.
Listo de la sponsoroj: https://edukado.net/prie/subteno/listo
Listo de la regulaj kontribuantoj: https://edukado.net/prie/subteno/regulaj

Se en 2018 aŭ poste vi sendis mondonacon de 52, 26 kaj 5 eŭroj aŭ pli altajn sumojn
(laŭ via landkategorio https://goo.gl/vZjkzv )
vi rajtas havi aliron al la instrumaterialoj dum unu jaro ekde la monsendo. Pagintoj de pli altaj sumoj havas aliron proporcie kun la donaco. Sponsoroj ne havas limigon.
La administro de tiu parto ne estas aŭtomata, tial, vian deziron je tiu rajto bv. anonci al la redaktoro.

## *V. 6. RESUMA FINANCA TABELO*

| | 2014 | 2015 | 2016 | 2017 | 2018 | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| *Ricevitaj donacoj laŭ fojoj* | | 84* | | 149 | 115 | |
| *Individuaj diversaj donacintoj* | 87 | 48 | 102 | 90 | 71 | |
| *Donacoj de grupoj, asocioj, fondaĵo* | 14 | 16** | 14** | 13** | 14** | 12-foje la sama el BE + Armor – FR Ausburg DE |
| *Novaj sponsoroj* | 6 | 3 | 1 | 1 | 4 | Ekde 500 eŭroj |
| ***Jarkomenca bilanco*** | 13 357,23 | 19 394,66 | 24 256,62 | **19 332,07** | 23 765.98 | |
| | | | | | | |
| **Donacoj *Entute*** | 21 386,16 | 14 839,19 | 11 234,57 | **12 437,58** | 10327.24 | Detaloj por sponsoroj en la sekvaj paĝoj |
| ***Aliaj enspezoj*** | 156,41 | 98,09 | 36,44 | **323,87** | 429.02 | |
| ***Sume* enspezoj** | 21 542,57 | 14 937,28 | 11271,01 | **12 761,45** | **10756.26** | |
| ***Elspezoj*** | -15 505,10 | -10 043,31 | -16 195,56 | **- 8 327,54** | -5047.11 | |
| ***Jara bilanco*** | 6 037,47 | 4 893,97 | -4924,55 | **4 433,91** | 5709.15 | |
| ***Tutbilanco jarfine en €*** | 19 394,66 | 24 256,62 | 19 332,07 | **23 765,98** | **29475.31** | |

**La publika parto de la raporto ĉi tie finiĝas. La pli detala financa raporto disponeblas nur por la sponsoroj kaj subtenantoj.**

**Viajn demandojn aŭ komentojn pri la raporto kaj nia agado vi povas publike starigi en al FORUMO: https://edukado.net/komunumo/forumo?f=750 aŭ skribi al la redaktoro.**

***Raportis Katalin Kováts, redaktoro redaktanto@edukado.net***

***La raporton aprobis la estraro de la Fondaĵo 10an de marto, 2018***

Subtenpaĝo: https://edukado.net/prie/subteno